

## Du sinsekvaj aranĝoj en Ĉeĥio kun aŭstra veterano

En aŭgusto okazis en Ĉeĥio tri Esperanto-aranĝoj. Post la solenaĵo de la 85-a datreveno de la Esperanto-klubo Svitavy sekvis senpere du paralelaj okazaĵoj, nome Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice kaj Ekumena Kongreso en Poděbrady.

**M**i elektis post Svitavy daŭrigi mian esperantumadon en la Ekumena Kongreso, kio allogis ankaŭ mian multjaran amikon, 93-jaran aŭstran Esperanto-veteranon Martin Stuppniĝ; aŭtoron de la sukcesa verko *Home en senhometo*, kies unua eldono de 300 ekzempleroj elĉerpiĝis jam post malpli ol 2 jaroj. Tio estas efektive miraklo koncerne Esperanto-librojn. Tial mi realigis per mia eldonoj KAVA-PECH la 2-an eldonon, kompletigitan per mia antaŭparolo (pri la aŭtoro) kaj lia postparolo, fakte petita de la legantoj, nome kiel iris lia vivo post la milito. Kaj tiun libron mi prezentis ene de ambaŭ aranĝoj, post kio Martin diligente subskribadis ĝin al pluraj aĉetintoj. La libron *Home en senhometo* kaj ĉiujn ceterajn librojn eldonitajn de KAVA-PECH vi povas aĉeti en multaj libroservoj aŭ rekte ĉe <http://kava-pech.cz/esperanto>.

La germanan originalon *Kriegsimpresionen* esperantigis ne Martin Stuppniĝ, sed la hungara profesia tradukisto el la germana, Jozefo Horváth. Decas do klarigi, kial ne faris tion la aŭtoro mem, ja perfekta esperantisto. Pri tio kulpas lia okulmalsano, pro kiu li ne plu povas rigardi ekranon pli longe ol kelkajn minutojn; sufiĉaj por komuniki per retmesaĝoj, sed ne plu por verki aŭ traduki libron.



Neformala babilado en la Esperanto-muzeo: apud Martin sidas prezidantino de ĈEA Libuše Hýblová

Iom pri la aranĝoj: La solenaĵo en Svitavy havis tre riĉan kulturalan programon kun bunta internacia partoprenantaro. Bele koncertis Anjo Amika el Hungario kaj Jana Muzetskaja el Rusio, te-ceremonion prezentis Zhang Ping (Ĝoja) el Ĉinio. La tuta programo estis vive prezentata ĉe jutubo. Kiu ne sukcesis ĝin sekvi en la reala tempo, povas rigardi ĝian registraĵon. Sufiĉas serĉi ĉe <http://youtu.be> la vortojn Svitavy, Esperanto kaj al tio aŭ Anjo, aŭ interkona vespero, aŭ Ĝoja.

El Svitavy mi veturis al la Ekumena kongreso kune kun Martin en la banlokon Poděbrady. Ĝin ĉeestis 78 partoprenantoj el 14 landoj kaj diversaj eklezioj (romkatolika, grekkatolika kaj pluraj protestantaj). Krom la kutimaj matenaj kaj vesperaj preĝoj kaj diservoj (kaj katolikaj mesoj) okazis multaj prelegoj, ne ĉiam ligitaj al teologio. Mi ekzemple prezentis du prelegojn, pri la vivo kaj verko de Francisko Valdomiro Lorenz, kaj pri komunaj misioj de Komenio kaj Zamenhof. Krom tio okazis ankaŭ tre interesaj ekskursoj. El ili por mi, eldonisto, estis la plej interesa historia librobindejo en Rožďalovice, por aliaj sendube ĉevalbredejo en Kladruby nad Labem aŭ la historia urbo Kutná Hora (registrita en la listo de kulturaj heredaĵoj de Unesko). Necesas ankaŭ menciigi la kulturajn posttagmezojn; dum unu kantis la solisto de la ŝtata operejo en Prago Richard Haan Bibliajn kantojn de Antonín Dvořák kaj lia edzino,



Martin kun la ĉefino de Esperanto-muzeo en Svitavy Libuše Dvořáková



Martin alparolas partoprenantojn de la ekumena kongreso. Apud li estas prezidanto de KELI Philippe Cousson



Japanaj partoprenantinoj de la kongreso prezentas mallongan teatraĵon

solistino de la praga teatro Semafor kaj filino de la bone konata operkantisto kaj esperantisto Miroslav Smyčka, Jolana Haan Smyčková, kantis ankaŭ du kantojn en Esperanto. Aliaj posttagmezon oni povis ĝui la lokan Kantĥoron de S-ta Cecilio.

Sed reen al Martin Stuppnig: Li ne aliĝis kun iu speciala prelego aŭ alia programero, tamen li apartenis ambaŭloke al la plej admirataj ĉeestantoj. Ne nur pro siaj interesaj kaj trafaj intervenoj, sed oni admiris ĉe li ankaŭ liajn daŭrajn junecajn aspekton kaj pensmanieron. Sed kiel li malkaŝis en neformala babilrondo, tio ne estas hazardo, li faras por tio multon. Ekde juneo li seninterrompe ĉiumatene gimnastikas (minimume "kvin tibetanojn"\*), al kio li ĉiam ion aldonas) kaj ĉiutage li vigle piediras minimume 5 kilometrojn. La gimnastikadon li neniam ellasas, eĉ kiam li estas survoje, kio ja ĉe li oftas. Krome li ankaŭ estas plu publike aktiva, iras de iu tasko al alia, per kio li ekzercas ankaŭ sian cerbon.


Kion aldoni? Mi kun admiro publike deziras al mia amiko Martin Stuppnig, ke lia nekredbla korpa kaj spirita juneo daŭru ankoraŭ multajn jarojn kaj portu al li ankoraŭ multan ĝojon, kompreneble ankaŭ per kaj por Esperanto.

Teksto kaj fotoj: Petro Chrdle, [www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz)

\*) Populara aro da kvin gimnastikaj rutinaĵoj, kiuj devus havi sanigan efikon kaj al la korpo kaj al la spirito de la homo.



La kongreso: vespera amuziĝo en la klubejo post fino de la programo



Jolana Haan  
Smyčková  
post la koncerto

## Kriegsimpressionen – zweite Auflage

Viele Leser von Martin Stuppnigs Werk in Esperanto Homo en senhometo und auch die, die sich noch nicht zutrauen ein umfangreicheres Buch in Esperanto zu lesen, bedauern, dass die deutschsprachige Ausgabe nicht mehr verfügbar ist. Deshalb entschied ich mich, die zweite Auflage des Buches – erweitert um die Anhänge, die ich für die Esperantosprachige Version verfasste – in meinem Verlag KAVA-PECH herauszugeben. Es wird sich sich um eine kleine, schöne und gebundene Auflage handeln, deren Preis daher etwas höher, aber immer noch günstig sein wird: 18 €. Das Buch werde ich noch dieses Jahr veröffentlichen, spätestens aber im Jänner 2019.

Um die Auflagenhöhe entsprechend planen zu können, bitte ich Interessierte um ihre Vorbestellungen. Nach Erscheinen wird das Buch um 18 € plus 6 € Versandkosten, also insgesamt 24 €, verschickt (die tatsächlichen Versandkosten sind höher). Wer das Buch schon vor Erscheinen bezahlt, erhält es um 18 € inklusive Versand zugesendet.

Sollten Sie Interesse an Martin Stuppnigs Kriegsimpressionen haben, kontaktieren Sie mich bitte über E-Mail.

Petro Chrdle, Verlag KAVA-PECH,  
[chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)